

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio honore al Charles Ecabert, kiu mortis la 15-an de decembro 1962.

Maloftaj estas la intimuloj, al kiuj Charles Ecabert malkaŝis la fundon de sia penso. Malfacilaj viv-cirkonstancoj lin prudentigis. Pro tio malmultaj estas tiuj, kiuj konsciiĝis pri la graveco kaj diverseco de liaj okupoj kaj interesoj. La hazardo permesis retrovi kelkajn el liaj gazetartikoloj, noveloj, prelegtekstoj, poemoj aŭ muzikaj komponaĵoj.

Ekde aŭtuno 1959 mi havis la grandan privilegion renkonti Charles Ecabert sufiĉe regule. Mi instruis al li nian lingvon kaj nian literaturon dum kelkaj monatoj, kaj poste mi kunlaboris kun li en la centra komitato de Esperanto-Edukistaro de nia lando, kies prezidanto li fariĝis tre rapide.

En sia unua radio-prelego Charles Ecabert rakontis al vi la 18-an de julio 1962, kiel li fariĝis esperantisto. Post ĉeesto en zamenhofa jubileo, dum kiu parolis d-roj Edmond Privat kaj Pierre Bovet, kantis kaj recitis infanoj el lernejoj de la ĵurasa montaro, prelegis japana ĵurnalistino s-ino Joŝiko Kaĵino, Charles Ecabert deziris ankaŭ povi paroli la mondan lingvon. Jen kion li diras : « *Konstatinte, ke personoj tiel diversaj kaj malproksimaj, ĉu aĝe, ĉu nacilingve, sin flue, belsone kaj ĝoje esprimis kaj inter si komprenas, mi konsideris kiel urĝan devon min dediĉi al la lernado de esperanto. Kaj mi konfesas, li daŭrigas, ke mi neniam bedaŭris tiun penadon, kiu min riĉigis pli ol mi iam esperis. Ĝis tiam mia atento kaj celado precipe koncentriĝis sur la latina antikveco. Sed ekde tiu momento mi havis la impreson vidi la horizonton malfermiĝanta kiel matena krepusko post nokta obskuro. Mi povis rilati kun la hodiaŭa mondo en ĝia tuta vasteco kaj vivanteco, kaj mi benas la horon je kiu mi renkontiĝis kun la esperanta lingvo kaj movado.* » (Fino de la citaĵo).

Lia konvertiĝo al esperanto neniel signifis tamen rompo kun lia pasinteco. Kiuj ĉeestis la trian manifestacion **Esperanto en la lernejoj**, kiun Charles Ecabert mem organizis la postan jaron, do en 1960, en sia klasejo, tiuj konvinkiĝis pri tio. La regreso de la latina lingvo maltrankviligis nian humaniston, kiu serĉadis ĉiujn eblajn rimedojn, kiuj povus savi la klasikajn studojn de pereco-danĝero. En brila parolado Charles Ecabert priskribis la nunan farton de la latina lingvo en la svisaj gimnazioj. Li citis statistikon, kies ĉiferoj parolas de si mem. En 1958 ankoraŭ 20 procentoj de la gelernantoj de la kvara klaso estis latinistoj. La postan jaron la latinistoj reprezentis nur 9 procentojn, kaj en 1960 8 procentojn de la samaĝaj gelernantoj. Por Charles Ecabert ekzistas problemoj, kiu estas solvenda plej rapide, antaŭ ol rompo inter la humanista kaj scienca kulturoj estos okazinta. Li vidis en esperanto solvon al tiu gravega problemoj, eble la solan solvon. Se la junuloj forlasas iom post iom la studon de la antikvaj lingvoj, tio ne estas pro seninteresiĝo pri la fontoj de nia kulturo, sed pro neceso, ĉar la programoj estas ĉiam pli ŝarĝataj. La nombro de konendaj lingvoj kreskas. La ĝeneraligo de la instruado de esperanto permesus repensi la lingvo-instruadon. Tiam certe la greka kaj latina lingvoj retrovus sian lokon en la programoj. Kaj dank'al esperanto la lingvo-instruado trovos gramatikan bazon.

Mi ne scias, ĉu ekzistas ankoraŭ multaj latinistoj kapablaj flue paroli la lingvon de Cicerono. Charles Ecabert estis unu el ili. Pri tiu kono li neniam fieris. Kontraŭe li sentis sin respondeca pri la sorto de la lingvo, kiun li tiel bone majstris. Li sentis la bezonon reformi ĝian instruadon.

Charles Ecabert ankaŭ tre bedaŭris, ke pro la sinteno de la latinistoj la gimnazianoj de sciencaj sekcioj ne povas profiti pri la avantaĝoj, kiujn alportus la studo de la etimologio. En grava raporto prezentita en la komisiono pro la reorganizo de la duagrada instruado li proponis por la ne-latinistoj instruadon de la grekaj kaj latinaj radikoj por la etimologio de la franca lingvo. Tiu studo devus esti gradigata. Laŭ ritmo de po tri ŝlosilvortoj semajne estus

eble instrui plej detale 400 ĝis 500 radik-vortojn dum kvar jaroj. Tiel niaj estontaj sciencistoj konus multe pli bone sian lingvon, kaj ili ĝuus, dank'al la studo de la etimologio, pri same bona komprenkapablo de sia lingvo, ol la latinistoj.

La latinistoj ne komprenis Charles Ecabert. Ili eĉ akre kritikis lin. Tamen nia samideano daŭrigis sian vojon. Por li nia intima personeco ne estas disigebla de nia majstreco de la ĉiutaga lingvo. Ju pli ni majstras nian lingvon, des pli nia personeco lumiĝas. Por Charles Ecabert, konservi ĵaluze siajn konojn estas vera peko.

En tre bela poemo dediĉita al Mistral Charles Ecabert diras sian respekton kvazaŭ religian por la lingva fenomeno. Mi ne povas legi tiun poemon, kiu estas verkita en la franca lingvo. Mi tamen provas traduki la du lastajn versojn. Ili celebras la revivigiston de la provenca lingvo. Sed ili ankaŭ povus celebri aliajn homojn, kies tuta vivo estis dediĉita, kiel tiu de nia samideano, al la servo de la lingvoj, la motoro de la civilizo.

*Grandegas, ho Mistral, via merito kaj sorto
Se la lingvo estas sankta, se ĝi estas la digno de l' homoj !*

La 15-an de decembro, pensu al s-ino Charles Ecabert, kiu ploros la unuan dat-revenon de la morto de sia edzo, kaj ankaŭ meditu tiujn belajn versojn, kiuj povus ankaŭ celebri la meriton de Zamenhof.

*Grandegas, Zamenhof, via merito kaj sorto
Se la lingvo estas sankta, se ĝi estas la digno de l' homoj !*

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond honoris Charles Ecabert.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-